

Jürgen Henkys,  
Der 23. Psalm

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Jürgen Henkys,  
La 23a psalmo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Paŝtisto mia estas mia Dio.  
Li gvidas min, ne mankas al mi io.  
Li gvidas, sekvas mi ĝis verda monto,  
jen kie estas pura, freŝa fonto.  
Li daŭre min per akvo refreŝigos.  
Neniam Li min ial pereigos.

2. Kondukas la Sinjoro de l' ĉielo  
sur ĝusta voj' min ĉiam al la celo.  
Kaj kvankam migras mi tra ejoj ombraj,  
tra val' malhela, inter muroj sombraj,  
Vi estas apud mi, min gardas Via  
baston', ne trafos min malbono ia.

3. Kaj malgraŭ malamika ar' envia  
regalas Vi min per manĝaĵo ĉia.  
Vi oleumas bene kapon mian  
renovigante interligon Vian.  
Ne ĉesos ja boneco Via iam.  
En Via domo restas mi por ĉiam.

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JÜRGEN HENKYS (\*1929-11-06).*

*Arg-801-1606 (2013-01-31 11:11:58)*

*Origina germanalingva teksto de JÜRGEN HENKYS (1991) Ursprünglicher Text der von Jürgen Henkys in 1991 verfassten Nachdichtung des 23. Psalms aus den Alten Testament, entnommen aus dem Gesangbuch für die Evangelisch-reformierte Kirche in Deutschland, Ausgabe 1996, ISBN 3-579-0037-3 und 3-579-0047-0. Lied Nr. 613..*

*Traduko de la Germana poemo "Der 23. Psalm" de JÜRGEN HENKYS (\*1929-11-06) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2005-02-28.*

*MR-433-1 / Arg-801-1607 (2013-01-31 11:14:04)*

*Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejnn [http://de.wikipedia.org/wiki/J%C3%BCrgen\\_Henkys](http://de.wikipedia.org/wiki/J%C3%BCrgen_Henkys). Vidu ankaŭ: [http://www.v-r.de/de/person-0-0/juergen\\_henkys-4331/](http://www.v-r.de/de/person-0-0/juergen_henkys-4331/).*